WIKIPEDIA

Manksa lingvo

La **manksa lingvo** (mankse: *Gaelg Vanninagh*) estis formortanta en la 20-a jarcento kiel unua lingvo, sed revivigita danke al lingvoaktivistoj. Ĝi estis gaela lingvo sur la Manksinsulo (Britio). Ties plej proksima parenco estas la skotgaela lingvo. La lingvon tre influis la skandinavaj lingvoj.

Manksa lingvo	
Gaelg Vanninagh	
Parolata en	Manksinsulo
Parolantoj	1 823
Denaskaj parolantoj	malpli ol 100
Fremdlingvo / dua lingvo por	1000–2000
Skribo	latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
kelta	
q-kelta	
gaela	
Oficiala statuso	
Reguligita de	Yn Cheshaght Ghailckagh
Lingva statuso	5 krize endanĝerigita
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	gv
ISO 639-2	glv
ISO 639-3	glv
Glottolog	manx1243
Angla nomo	Manx
Franca nomo	mannois

Enhavo

Historio

Parolantoj

La manksa kiel skribita lingvo

Vort-trezoro

Nombroj

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Historio

La manksa lingvo estis ankoraŭ en la 18-a jarcento viva lingvo kun ĉirkaŭ 20.000 parolantoj – preskaŭ la tuta tiama loĝantaro de manksinsulo. Tio ŝanĝiĝis ekde 1765, kiam la Brita Reĝlando aneksis kaj dum pli ol 100 jaroj la lingvon subpremis. En 1899 fondiĝis por konservo de la lingvo *Yn Cheshaght Ghailckagh* (la manks-gaela asocio). La lingvon parolis kiel gepatran lingvon nur kelkaj homoj en la 1930-aj jaroj. Ili klopodis trovi ankoraŭ homojn, kiuj parolas la lingvon, sed ties nombro estis en 1946 nur 20 personoj. En la 1950-aj jaroj komencis surbendigi la asocio la originan elparolon, lingvon. La lasta gepatra parolanto de la lingvo Ned Maddrel mortis en 1974.

Parolantoj

Dumtempe la nombro de parolantoj kreskis ĝis kelkaj centoj. La personoj, kiuj parolis la lingvon kiel duan lingvon, estis en 1991 jam 634 el ĉirkaŭ 80.000 loĝantoj.

Ekzistas provoj revivigi la lingvon, tiel ekzistas la eblo ekde 1992 por ĉiu lernanto, lerni la manksan lingvon kiel duan lingvon. Jam en la unua jaro vizitis la kursojn 1.400 lernantoj.

Nun ekzistas eĉ personoj, kiuj parolas la manksan, kiel la anglan, denaske. La plej aĝa el ili estis en la jaro 2005 14-jara.

La manksa kiel skribita lingvo

La plej malnovaj skribatestaĵoj de la lingvo venas el la 17-a jarcento. Literaturo apenaŭ ekzistas, karakterizaj estas la baladoj kaj la Christmas Carol; kristnask-nokta kanto.

Brian Stowell, unu el la plej gravaj korifeoj en la moderna movado por la revivigo de la manksa lingvo

Vort-trezoro

Ŝlosilo:

- *Skot* – Skotgaela lingvo
- *Irl* – Irlanda lingvo

Manksa	Esperanto	Plej proksima irlanda aŭ skotgaela varianto
Moghrey mie	Bonan matenon	Maidin mhath *(Skot)*
Fastyr mie	Bonan vesperon	Feasgair math *(Skot)*
Slane lhiat *(singulara)*, Slane lhiu *(plurala)*	Ĝis revido	Slán leat *(sing.)*, Slán libh *(plur.)* *(Irl)*
Gura mie ayd	Dankon	Go raibh maith agat *(Irl)*
baatey	boato	bata *(Skot.)*
barroose	buso	bus
blaa	floro	blath
booa	bovo	bó *(Irl)*
cabbyl	ĉevalo	capall
cashtal	kastelo	caisleán *(Irl)*
creg	roko	creag *(Skot.)*
eeast	fiŝo	iasc *(Irl.)*
ellan	insulo	eileann *(Skot.)*
gleashtan	aŭto	gluaisteán *(Irl.)*
kayt	kato	cat *(Irl.)*
moddey	hundo	madra
shap	vendejo	siopa *(Irl.)*
thie	domo	taigh *(Skot.)*
ushag	birdo	uiseag=alaŭdo

Multaj lokoj prezentas dulingvajn ŝildojn. Notu la konsonantan ŝanĝon de *Doolish* (Douglas) al *Ghoolish*.

		(Skot.)
jees	paro	dís *(Irl.)*

Nombroj

Manksa	Esperanto	Plej proksima irlanda aŭ skotgaela varianto
nane	unu	aon
daa	du	dha *(Skot.)*
tree	tri	trí
kiare	kvar	ceathair *(Irl.)*
queig	kvin	cuig *(Irl.)*
shey	ses	sé *(Irl.)*
shiaght	sep	seacht *(Irl.)*
hoght	ok	ocht *(Irl.)*
nuy	naŭ	naoi *(Irl.)*
jeih	dek	deich *(Irl.)*
nane jeig	dekunu	aon déag *(Irl.)*
daa yeig	dekdu	dhá dhéag *(Irl.)*

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio

Eksteraj ligiloj

- MacAoidh, Garbhan. "Reviviĝo de mortinta lingvo". *Monato*, februaro 2006, p. 22. (https://www.monato.be/2006/008740.php) (la tuta magazina numero jen en formato pdf (http://gazetejo.org/system/files/gazetoj/MONATO_20063.pdf))
- Makaj, Garvan. "Brian Stowell reviviganto de mortinta lingvo". (https://www.monato.be/2008/009420.php) Monato (gazeto) (2008/04 p. 14)
- http://homepages.enterprise.net/kelly/FRONT/INFO/info.html
- http://gv.wikipedia.org Vikipedio en la Manksa lingvo
- http://www.gaelg.iofm.net/EMENU.html
- http://www.isle-of-man.com/manxnotebook/history/manks

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Manksa_lingvo&oldid=6664473"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 11:06, 8 jul. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.